

Eŭropa Bulteno

Majo 2008, № 5 (70)

De la redakcio...

Karaj legantoj,

Proksimiĝas somero kaj mi volas atentigi vin pri someraj aranĝoj por infanoj kaj familioj. Tiuj aranĝoj estas bona ebleco por viaj infanoj aŭ lernantoj praktiki komunikadon en internacia lingvo kun siaj samaĝuloj el aliaj landoj. Per ludoj kaj rakontoj kun siaj amikoj ili plej rapide progresos. En la sekvaj retpaĝaroj vi povas trovi multajn interesajn informojn pri la menciitaj aranĝoj. Por pliaj informoj kontaktu la organizantojn.



La 39-a Internacia Infana Kongreseto, 16 – 26-a de julio 2008,
<http://bertosch.free.fr/iik2008/index.html>

La 30a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF) de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2008,
<http://bertosch.free.fr/ref2008/index.html>

IJK Internacia Junulara Kongreso, <http://esperanto.net/ijk2008/>

Ankaŭ MKR-n (Montkabana renkontiĝo) en la lastaj jaroj partoprenas pli kaj pli da familioj kun infanoj. En la jaro 2007, MKR okazis sur insulo Cres en Kroatio, kie partoprenis eĉ 9 infanoj inter 3 kaj 13 jaroj (entute estis 43 partoprenantoj). <http://www.keja.hr/mkr.html>

Eblecoj estas multaj, pliajn vi povas trovi ĉe diversaj e-kalendaroj.

Agrablan legadon de la Bulteno,
Vesna Obradović

ELDONITA LIBRO DE PREZENTITAJ TEMOJ DUM KONFERENCO PRI INTERKULTURA DIALOGO KAJ KOMUNIKADO, OKAZINTA EN MARIBOR 2007

La 22-an de majo en Maribor nome de EEU kaj Esperanto-societo de Maribor Zlatko Tišljar publike prezentis en la ejoj de la Popolunioversitato (AZM-LU) novan eldonaĵon de EEU, la libron »Interkultura dialogo kaj komunikado«. La libro estas rezulto de la projekto, kiun kunfinancis kaj aprobis Eŭropa Unio, fondaĵo por Aktiva Civitaneco. En la libro sur 96 paĝoj A-4 formata aperis ĉiuj 10 referaĵoj de la samnoma Eŭropa Konferenco okazinta julie 2007 en Maribor. Ĉiu referaĵo aperis en la gepatra lingvo de la referanto kaj paralele en Esperanto kun resumo en la germana. Tiel oni aplikis la principon de multlingveco. Krom la referaĵoj aperis la tuta programo de la konferenco kaj la konkludoj en Esperanto kaj la germana. Jen la titoloj de la referaĵoj (interparenteze la kroma lingvo en kiu aperis la artikolo):

Vera Barandovska Frank »Komunikado en fikciaj kulturoj« (ĉeĥa)

Malgorzata Handzlik »Dialogo kiel komunikilo en la integriĝo de Eŭropo« (pola)

Aleks Kadar »Al novspeca 3-direkta lingvopolitiko: por regiona, landa kaj internacia lingvo« (franca)

Vladimir Larichev »Tutmondiĝo kaj interkultura interago« (rusa)

Francois Lo Jacomo »Ĉu internacia lingvo havu propran kulturon« (franca)

Hans Michael Maitzen »La Alpa Regiono – Eŭropa renkontejo de lingvoj kaj kulturoj« (germana)

Ljudmila Novak »La kono de la lingvoj por pli bona komunikado« (slovena)

Sean O Riain »Esperanto por pliefikigi la Eŭropan Union« (angla)

Vinko Ošlak »La vera problemo de etnaj minoritatoj« (slovena)

Zlatko Tišljar »Sub kiuj kondiĉoj interkultura dialogo eblas?« (slovena)

Pri la prezento de la libro raportis kelkaj lokaj radio-stacioj.

Zlatko Tišljar

MARTIN, LA LINGVOKREONTO

dimanĉo 17a de Februaro 2008

Hieraŭ mi (K) estis kun Martin (M) sola dum la tuta tago. Posttagmeze ni sidis sur la balkono kaj dum mi fermis la okulojn li manĝis glaciaĵon. Subite li ekparolis (1)

M: Mi volas fari novan lingvon.

K. (malfeminte la okulojn pro la surpiziĝo). Novan lingvon?

M. Jes, por la kompatindaj belgaj homoj.

K.???

M. Mi ne komprenas kial Zamenhof ne por ili faris Esperanton.

K. Kial vi diras tion?

M. La belgiaj homoj ne havas lingvon. Ili parolas la lingvon de aliaj landoj. Kaj pro tio ili certe kverelas. Mi volas fari por ili la belgian lingvon.

K. Sed estas multaj aliaj landoj, kie oni parolas plurajn lingvojn, fakte de aliaj landoj. Ekzemple ankaŭ en Svislandoj. Tie estas eĉ 4 lingvoj.

M. Ĉu ankaŭ Monika (2) kverelas en Svislando?

K. Kial ŝi kverelus? Kaj kun kiu?

M. Papa diris, ke Zamenhof faris Esperanton por ke oni ne kverelu, ĉar la homoj ne komprenis unu la alian.

K. Hm, jes, parte veras. Kaj kial ne diri al la belgoj kaj svisoj ke ili lernu Esperanton? Tiel ili povus paroli ankaŭ kun ni, ĉiuj aliaj?

M. Ne, ne estas bona ideo. Unue ankaŭ ili havu sian lingvon, la "belgian" kaj la "svislandian". Ĉar ili ne havas propran lingvon. Tiel estus juste.

---- Silento, kelkaj lektoj al la glaciaĵo kaj kapto de sunradioj...-----

K. Kaj kiel vi volas fari la lingvon?

M. Mi skribas sur folion. Ankaŭ Zamenhof skribis vortojn.

K. Kiujn vortojn, ekzemple, kiajn vi skribus ?

M. Pordo ... tablo libro....

K. Sed tiuj estas esperantaj vortoj. Do, kiel estus en via lingvo "manĝi"...

---- Martin diris neripeteblan sonkombinaĵon. Ĉu volapuke?

K. Bone, kaj kiel vi dirus: mi manĝas, vi manĝas.... (3)

M. (post iom da cerbumado) Ne gravas kiu manĝas. Unu vorto sufiĉas por tio.

K. Se ne gravas, donu al mi vian glaciaĵon, kaj nun MI manĝas, kaj VI sunbaniĝas.

--- Martin ekridetis kaj por tiu tago ni finis lian lingvoprojekton.

1) en la hungara lingvo, kun eraretoj. Liajn vortojn kaj stilon mi provas redoni en E-o.

2) Monika Molnar, kiun Martin tre ŝatas

3) en la hungara estas pli granda diferenco ol en Esperanto

 Kiuj aferoj povis influ Martin por ke li ekhavu tiun ideon?

♦ Martin (6-jara) nun en januaro ekparolis E-on , kiun li pasive konis jam, aŭdante nin, gepatrojn ĉiam nur tiun lingvon paroli. (Kun li mi parolas la hungaran, mia edzo la francan, kaj li lernas en nederlanda lernejo)

♦ Sylvain antaŭ semajno parolis al li pri Zamenhof kaj la kreado de la lingvo, ĉar li demandis denove kie estas Esperanto-lando kaj kia estas tie la aŭtoŝildeto kaj kiel ekestis Esperanto.

♦ Antaŭ kelkaj tagoj Margareta Symoens vizitis nin el Belgio. Martin konsciis ke ŝi parolas kaj la nederlandan kaj la francan, sed loĝas en Belgio. Sed ni ne parolis pri lingvaj porblemoj dum tiu vizito.

♦ Kaj eble Martin en la genoj heredis mian emon konsciigi homojn pri la lingvofarado.

Vidu mian eksperimenton kun studentoj antaŭ pluraj jaroj.

http://www.esperantic.org/librejo/dbstudoj/19_katalin.htm

Katalin Kováts

FRINGOJ

En aprilo en Francio 13 gelernantoj de „Verdaj Papilietoj“ de elementa lernejo el Gubin partoprenis en „Fringoj“, Festa Renkonto Internacia de Geknaboj. Estis polaj kaj francaj infanoj. Printempo kaj bela, stila, malnova kastelo / kun fantomo, kompreneble... / en Grezijono /apud Angers/ tre bone taŭgis por tio.

29 infanoj havis okazon por kontroli, ĉu ili jam konas Esperanton por paroli kun aliaj. Ĉiuj asertas, ke Eo estas facila ... sed oni devas koni multe da vortoj por paroli dum la tuta semajno! Ekzerco faras majstron!



Ĉiuj infanoj kune kantis, promenadis sur la grezijona parko, muzikis, ludis, dancis, ĵonglis, preparis magiaĵojn, faris reciklitajn paperojn / ĉiuj havas sian propran leterpaperon por memoro!/, turnobrilojn, teatrumis... Pola grupo kun 3 gefrancoj preparis teatraĵon „La krakova drako“ laŭ pola legendo. Estis ankaŭ desegnaĵoj laŭ la temo „Estu sana“. Iun tagon ĉiuj partoprenis en interesa vojaĝo al Kamparo de Trogloditoj en Rochemenier. Neforgeseble!

Al la pola grupo plaĉis franca manĝaĵo /dankon, kara Brigitte kaj Andre!/, tre bongusta, kvankam iom alia ol la pola. Unue ili scivoleme taksis per okuloj, poste gustumis. Nun ankaŭ hejme ili manĝos volonte ekzemple la marfruktojn...

La lasta tago estis malfermata ankaŭ al ekstera publiko. Invito estis en franca gazeto. Okazis granda festo kun spektaklo, ekspozicio de laboroj kaj prezentado, kion ĉiuj infanoj ellernis. Al gastoj, kiuj venis en vendredo, ĉio tre plaĉis kaj laŭte aplaŭdis! Post kelkaj tagoj en franca gazeto estis artikolo pri „Fringoj“.

En amika, internacia etoso rapide pasis tagoj. Fine estis reciprokaj invitoj kaj sinceraj larmoj de adiaŭo. Kaj la decido, ke Esperanto estas tre grava kaj oni devas diligente lerni ĝin!

Poste Kacper, unu el polaj knaboj, diris: “Mi ne supozis, ke oni povas dum kelkaj tagoj tiel forte ekŝati la aliajn kaj farigxi amikoj ... “. Jes, ili ricevis donacojn de sinjorino Brigitte, “La Etan Princon” en Esperanto... Nun ili komprenas.

Ni dankas al Elizabet Barbay kaj al ĉiuj kunordigantoj, precipe al Teresa Liberska de Poznano, kiu helpis al nia pola grupo!

AKEL 1

KUNVENO SILFER - O RIAIN

La prezidanto de EEU laŭ la invito de G. Silfer renkontiĝis kun li dum la neformala vespermanĝo en Vilno okaze de la Tutmonda Kongreso de Esperantistaj ĵurnalistoj. G. Silfer proponis, ke iam Eŭropa kongreso okazu ekster EU en KCE, en la Chaux de Fonds, Svislando. Venontjare la kongreso okazos en Herzberg, nur post ĝi la estraro de EEU decidis pri loko de posta kongreso. Ĝis tiam akceptataj estos ĉiuj invitoj.


Georgo Handzlik

EKSPOZICIO EN FRANCIO

En ekspoziciejo »Agora«, la domo de Civitanaj Asocioj en St. Nazero (Francio) estas aranĝita en majo 2008 ekspozicio »Eŭropo kaj Junularo«. Parto de ĝi estas 8 afiŝoj pri Esperanto kreitaj de Danka Tiŝlar kaj en januaro ekspoziciitaj en la Eŭropa Parlamento en Bruselo.

Robert Leleu

BONVENON AL LA VIKIPEDIO EN ESPERANTO!



Vikipedio estas projekto por la konstruo de libera reta enciklopedio en multaj lingvoj. Ĉiu povas kontribui per sia scio. Ekde novembro 2001 ĝis la 1-a de junio 2008 estiĝis 99 617 artikoloj en la esperantlingva versio.

Ĉiuj — inkluzive de ĉiu leganto — povas redakti iun ajn artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolojn, skribeti, aŭ skribegi. La plej oftaj demandoj klarigas kiel redakti paĝon kaj aliaĵojn. En la paĝo “lastaj ŝanĝoj” aperas ĉiuj ŝanĝoj. Ĉiu povas kontribui libere, ĉar Vikipedio estas komuna projekto, ne finita verko, kaj ĝi senĉese ŝanĝiĝas. Se vi ŝatas kunlabori pri iu certa temo, superrigardu nian portalejon, kie estas listigitaj ĉiuj temaj portaloj. Tiuj, kiuj taksas Vikipedion altkvalita malgraŭ ĝia libera redaktado, skribu respondojn al kritikoj. Kontribuu skribante artikolojn, ke ni transigu la magian ciferon de 100.000 artikoloj.

<http://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88efpa%C4%9Do>

100 JAROJ DE KROATIA ESPERANTO-MOVADO

La 26-an de majo 2008 okazis solenaĵo okaze de 100-jariĝo de Kroata Esperanto-Ligo kaj zagreba Esperanto-movado. (En 1908 fondiĝis en Zagrebo Kroata Esperanto-Societo kvankam individuaj esperantistoj en Kroatio lernis E-on multe pli frue). Ĝin organizis KEL en la ĉefa kultursalono de Zagrebo, la koncertejo Vatroslav Lisinski kun 2000 sidlokoj. Tiam Esperanto-feston povas aranĝi verŝajne nur Zagrebo, ĉar mi dubas ke esperantistoj ie ajn aliloke en Eŭropo povas arigi 1500 spektantojn por festeno, sen havi internacian konsiston. En Zagrebo vivas miloj da homoj kiuj aŭ bone konas Esperanton aŭ almenaŭ iomete ĝin lernis. La solenaĵon planis kaj preparis Judita Rey Hudeček kaj Spomenka Štimec. Dum iom pli ol 2-hora programo oni prezentis la ĉefajn turnpunktojn en la kroata E-historio per ekrana prezento kaj intertempe prezentiĝis altkvalita kultura programo. Partoprenis 4 individuaj kantistoj (inter kiuj konata Zagreba operkantisto Neven Marzlečki), 1 ksilofonmuzikistino (nuna KEJA-prezidantino: Kaja Farszky), 2 romaaj dancistoj, tri muzikgrupoj (Aillu kun sudamerikaj kantoj, Makedona koruso Ezerki el Zagrebo, Dalmata »klapo« (virkoruso), ensemblo »7/8«, du gastkantistoj kun la grupo Ezerki, du infangrupoj (elementa lernejo Davorin Terstenjak kaj infanhejmo el Lekenik) kaj grupo de kantistoj de malnovzagrebaj kantoj Angeluši. Aparte elstaris la lerneja grupo da infanoj kun tre placha programo.



Speciale impresis la bona gvidado, altprofesia plenumado, preskaŭ plena salono kaj la fakto ke kroataj esperantistoj kunkreas la kroatan kulturon kaj vigle kunlaboras kun la kroata ĝenerala socio. Pri la aranĝo vaste raportis pluraj elektronikaj medioj kaj gazetaro de Zagrebo.

Zlatko Tišljar

DEBATO DE CAFEBABEL.COM EN BRUSELO: Multlingva edukado, ĉu nur por la elito?

En Les Halles Saint Géry en Bruselo okazis la 7-an de majo la debato sub la supra titolo. Partoprenis inter aliaj Leonard ORBAN, Komisionano pri lingvoj de EU, Christian DUPONT, ministro pri edukado por franca parto de Belgio kaj Henny-Annie BIJLEVELD, profesoro pri la nederlanda en la Libera Universitato de Bruselo. temis pri publika debato kaj partoprenis interalie ankaŭ pluraj esperantistoj: Sean O Riain, Flory Witdoeckt, Maja Tišljar, Remy Sproelants... Kelkaj el ili ankaŭ partoprenis en la debato stariginte demandojn rilatajn al Esperanto. Ŝajnas ke la esperantistoj eĉ troigis per la tro longaj diskutoj.

Zlatko Tišljar

FABELO: LA SEP KAPRIDOJ (Fratoj Grimm)

Estis iam maljuna kaprino, kiu havis sep idojn kaj amis ilin, kiel ĉiu patrino amas siajn infanojn. Iam ŝi volis iri en la arbaron por alporti nutraĵon. Ŝi alvokis ĉiujn sep kaj diris:

"Karaj infanoj, mi iras en la arbaron, gardu vin bone kontraŭ la lupoj; ne enlasu ĝin, ĉar alie ĝi manĝos vin kun haŭto kaj haroj. La fripono ofte aliformigas sin, sed vi tuj rekonos ĝin per ĝiaj nigraj piedoj kaj ĝia raŭka voĉo."

La kapridoj diris:

"Kara patrino, vi povas trankvile foriri, ni estos singardaj."

La patrino eklekis kaj foriris. Baldaŭ iu ekfrapis la pordon kaj ekkriis:

"Malfermu, karaj infanoj, via panjo alportis ion por ĉiu."

Sed la kapridoj rekonis la lupon per la raŭka voĉo:

"Ni ne malfermos," ili ekkriis, "vi ne estas nia patrino, ŝi havas delikatan voĉon, kaj la via estas raŭka, vi estas la lupoj!"

La lupoj iris en butikon kaj aĉetis grandan pecon da kreto. Ĝi manĝis ĝin kaj ĝia voĉo fariĝis delikata. Ĝi revenis, frapis la pordon kaj ekkriis:

"Malfermu karaj infanoj, via patrino alportis ion por ĉiu."



Sed ĉar la lupoj metis sian nigran piedon en la fenestron, la infanoj rekonis ĝin kaj diris:

"Ni ne malfermos, nia patrino ne havas nigrajn piedojn, kiajn vi: vi estas la lupoj."

La lupoj kuris al bakisto kaj diris:

"Mi dolorigis mian piedon, ŝmiru ĝin per pasto."

Kiam la bakisto faris tion, la lupoj kuris al la muelisto kaj diris:

"Ŝutu blankan farunon sur mian piedon."

La muelisto pensis:

"Ĝi volas iun trompi" kaj rifuzis, sed la lupoj diris:

"Se vi ĝin ne faros, mi manĝos vin."

La muelisto ektimis kaj blankigis ĝian piedon. Tiaj estas la homoj!

La fripono iris trian fojon al la pordo, frapis ĝin kaj diris:

"Malfermu, infanoj, jen revenis via kara patrino kaj alportis al ĉiu ion el la arbaro."

La kapridoj ekkriis:

"Antaŭe montru vian piedon, ni volas vidi, ĉu vi estas nia kara panjo."

La lupoj metis la piedon en la fenestron. Kiam la kapridoj vidis, ke ĝi estas blanka, ili kredis ĉion, kion la lupoj diris, kaj malfermis la pordon. Sed tiu, kiu eniris, estis la lupoj. Ili ektimis kaj volis sin kaŝi. Unu saltis sub la tablon, dua en la liton, tria en la fornon, kvara en la kuirejon, kvina en la ŝrankon, sesa sub la lavujon, sepa en la keston de la horloĝo. Sed la lupoj trovis ĉiujn kaj sen longaj konsideroj englutis ĉiujn unu post la alia; li ne trovis nur la plej junan, kiu sin kaŝis en la keston de la horloĝo. La lupoj satmanĝis, foriris, kuŝiĝis sur verda herbaĵo sub arbo kaj ekdormis. Baldaŭ la kaprino revenis el la arbaro. Kion ŝi ekvidis! La pordo estis larĝe malfermita, la lavujo dispecigita, la kusenoj kaj la kovrilo estis eltiritaj el la lito. Ŝi serĉis la infanojn, sed nenie trovis

ilin. Ŝi vokis ilin unu post la alia per la nomo, sed neniu respondis. Fine, kiam ŝi vokis la plej junan, eksonis delikata voĉo:

"Kara patrino, mi sidas en la horlogo."

Ŝi eltiris ĝin kaj ĝi rakontis, ke la lupo venis kaj manĝis ĉiujn aliajn. Oni povas imagi, kiel ŝi ploris pro siaj malfeliĉaj infanoj.

Fine ŝi eliris kun sia ĉagreno el la domo, kaj la plej juna kaprino sekvis ŝin. Kiam ŝi venis sur la herbejon, tie kuŝis la lupo sub arbo kaj ronkis tiel, ke la branĉoj tremis. Ŝi rigardis ĝin de ĉiuj flankoj kaj vidis, ke io moviĝas kaj tremas en ĝia ventro.

"Dio mia," ŝi pensis, "ĉu miaj infanoj, kiujn ĝi englutis por vespermanĝo, vivas ankoraŭ?"

La kaprideto devis kuri hejmen kaj alporti tondilon, kudrilon kaj fadenojn. Apenaŭ ŝi ektranĉis la ventregon de la monstro, unu kaprido jam etendis la kapon eksteren, kaj kiam ŝi daŭriĝis tranĉi, ĉiuj ses elsaltis unu post alia. Ĉiuj estis sendifektaj, ĉar la avida monstro englutis ilin vivantaj. Granda estis la ĝojo! Ili karesis la amatan patrinon kaj dancis, kiel la tajloro, kiu festas edziĝon. La kaprino diris:

"Iru serĉi ŝtonojn, ni plenigos per ili la ventron de la sendia besto, dum ĝi dormas."

La kapridoj rapide, rapide altrenis ŝtonojn kaj ŝovis ilin en la ventron de la lupo. La patrino senprokraste kunkudris ĝin; la lupo nenion sentis, eĉ ne moviĝis.

Kiam la fripono fine satdormis, ĝi leviĝis, kaj ĉar la ŝtonoj kaŭzis al ĝi grandan soifon, ĝi ekiris al la puto: la ŝtonoj ruliĝis kaj bruas en ĝia ventro. La lupo ekkriis:

"Oh, en ventro kia pezo,

Sentas ŝtonojn mi en mezo.

La kapridojn mi ja manĝis,

Kiu ilin tie ŝanĝis?"

Ĝi venis al la puto kaj kliniĝis al la akvo por trinki. La pezaj ŝtonoj entiris ĝin en la akvon kaj ĝi dronis. Kiam la sep kapridoj tion vidis, ili alkuris, kriante:

"La lupo mortis! la lupo mortis" kaj pro ĝojo dancis ĉirkau la puto.

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de majo 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Georgo Handzlik, Robert Leleu, Katalin Kováts, Fratoj Grimm, AKEL 1 projekto kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu